


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Gironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

EN LA LUMTURO.

La malgranda Klaŭs loĝis en granda, blanka lumturo, kiu staris sur la bordo de la Norda Maro, ne tre malproksime de la loko, kie la Elbe enfluas en la maron. Tie li loĝis kun sia avo Nils, la lumturogardisto, kaj Petro, la helpanto. La patrino de Klaŭs jam mortis kaj la patro estis direktilisto sur la velŝipo „La Marvirino”. Kaj „La Marvirino” veturis malproksimen al sudaj landoj.

Estis rave, loĝi tiel alte en lumturo! Almenaŭ tion opiniis Klaŭs, kiam li matene faris la longan promenadon al la lernejo. Ambaŭflanke de la vojo etendiĝis la herbejoj, kie brun- kaj blankmakulaj bovinoj kuŝante remaĉis kaj alrigardis Klaŭs per la grandaj okuloj, dume malvigle svingante la voston.

La lernejo plaĉis al Klaŭs, ĉar li ŝatis la lernadon, kaj post la studo li petolis kaj ludis kun la kamaradoj. Kaj malgraŭ tio li ĉiam ĝojis, kiam li povis hejmeniri al sia lumturo.

Tie interne estis malordinara aspekto, tute alia ol en simplaj domoj, opiniis Klaŭs. Laŭ kruta spiralaŝtuparo kun multaj, multaj ŝtupoj oni venis en la ĉambron, kie la lampoj lumis. Duoncirkle pendas dek grandaj lampoj malantaŭ dikaj vitroj, tra kiuj ili lumigas la maron. Malantaŭ ĉiu lampo pendas kupra reflektilo, kiun oni ĉiutage devas brile poluri. Tra pordeto oni povas veni sur ian balkonon, kiu tute ĉirkaŭas la turon.

De tie oni vidas malproksimen super la maro, kaj aliflanke trans la herbejojn al la vilaĝo, kaj rigardante malsupren, Klaŭs ekhavas kapturniĝon pro la profundo, en kiun li rigardas. Troviĝas pluraj ĉambretoj inter la dikaj turomuroj. Sub tiu ĉambro de la lampoj

estas du ĉambretoj kaj sub tiuj estas la ronda familia ĉambro kun etaj fenestroj. Velŝipeto pendas de la plafono kaj sur la ŝranko staras pajloŝtopita alciono (glacibirdo) kun etenditaj flugiloj. Tute malsupre estas la ejo por la oleo kaj la kuirejo, kie la ondoj batas la fenestrojn, kiam la maro altiĝas.

Klaŭs plej volonte sidas supre en la lampoĉambro kaj rigardas al Petro, kiu laboras aŭ rakontas historiojn al li. Tiu Petro tiel bele rakontas! Pri la fantomŝipo, kiun li foje mem vidis estante maristo, kaj pri la ŝipkoboldo, kiu alte sidas en la masto kaj jen subite malaperas.

Vespere kiam la lampoj lumas, svarmoj da birdoj alflugas, kiuj, blindigite de la lumo, frakasas sin kontraŭ la malmolaj vitroj. Mal-feliĉaj birdoj! Klaŭs volus kribi al ili: „Foriru ja! Ĉi tie estas danĝero por vi!”

Dum belaj someraj vesperoj Klaŭs sidas kun la avo sur la balkono. La avo pipfumas. Kaj ili ambaŭ observas la vaporŝipojn, la trimastulojn kaj la fiŝistbarkojn kun la brunaj veloj. Tie veturas multaj ŝipoj, tiom proksime de la Elbe-enfluejo.

„Nia turo havas tial gravan taskon kaj nia lumo ĉiam devas hele brili,” la avo ofte diras al Klaŭs. Kaj Klaŭs jesas kaj mienas kvazaŭ li multe komprenas pri tio. Li ja fariĝis jam dekonujara pasintsemajne.

„Vi ĉiam pli similas vian patron,” diras la avo. Kaj tiam ili interparolas pri la „Marvirino”, kiu en la aŭtuno eble ankros ĉi tie. Poste ili rigardas la sennombrajn stelojn sur la mallumiĝanta ĉielo, kiu volbiĝas super la maro. Kiom senmova nun kuŝas la maro.

En la aŭtuno estas ofte nebulo kaj senĉese sonas la sirenoj de la multaj ŝipoj. La avo kaj Petro havas tage kaj nokte laboron pro la lampoj. Sed fine de Oktobro venas serenaĵo kaj Petro, profitante la okazon, petas sian mastron, ĉu li por du tagoj povas iri al Hamburgo por la edziniĝo de sia fratino. La maljuna Nils donas la permeson kaj en la dimanĉaj vestoj Petro paŝas vilaĝen, por tie envagoniĝi.

Ankaŭ sekvantmatene la vetero estas serena. La avo, kiu laboris dumnokte, iras dormi kaj kiam li vekigatas, la ĉambro estas malluma. Estas tamen ankoraŭ ne malfrue. Sed okcidente leviĝas granda nubamaso.

„Ni havos ŝtormon,” pensas la avo, „mi devos frue lumigi la lampojn.” Ankaŭ Klaŭs rimarkas, ke venos ŝtormo, kiam li, veninte el la lernejo, staras sur la balkono.

„Ho, kia malvarma vento!” Li butonumas sian bluzon.

„Kaj kiaj ŝaŭmkapoj sur la ondoj; tio ankaŭ signifas, ke ŝtormo venos.” Kaj la nuboj amasoj pli kaj pli grandiĝas! Klaŭs iras malsupren al la familia ĉambro. Estas la kvina horo.

„Klaŭs,” diras la avo, „faru fajron en la kuirejo kaj metu la bluan kaldronon sur ĝin; mi volas havi ion varman antaŭ ol la longa nokto komenciĝas. Dume mi iros supren kaj funkciigos nian lumon.”

„Nia lumo”, tiel la avo parolis pri la dek lampoj.

Momenton poste, dum la fajro gaje ekflamas, Klaŭs aŭdas obtuzan frapon kaj tiam dolorĝemadon. Kio okazas? Li lasas la fajron kaj suprenkuras la ŝtuparon, du ŝtupojn samtempe. Ĉe la pordo de la ĉambro kuŝas la avo kaj dolore ĝemas: „Mi ekglitis — ho! mi ne povas ekstari” Tamen li provas. Grandpene li sukcesas kaj tremante li eniras la ĉambron. Tiel li atingas sian apogseĝon kaj ĝemante falas sur ĝin. Klaŭs estas ege timigita kaj rigardas la avon per grandaj okuloj.

„Nia lumo, nia lumo! Tio estas la plej grava,” diras la maljunulo; mi devas supreniri por lumigi la lampojn.” Li ekstaris, provas paŝi, sed kun dolorĝemo refalas sur la seĝon.


„Vi ne povas supreniri, ĉu mi iru al la vilaĝo por helpo?” demandas la knabo. „Ne Klaŭs, vi ne foriru, estas tro malproksime kaj daŭrus tro longe, kaj tuj estas mallume. Vi mem devas supreniri kaj lumigi kaj resti tie por prizorgi, infano mia, hodiaŭvespere kaj dum la tuta nokto. Komencu nun rapide, la tempo urĝas.” La avo ĉiam pli mallaŭte parolis. Li fermas la okulojn kaj kuŝas kun la kapo malantaŭen. Li estas senkonscia pro doloro.

II.

Klaŭs rapide suriras la ŝtuparon. Supre ankoraŭ estas lume, ĉar estas vitro ĉie. Tuj li ekfaras tion, kion li ofte vidis fari de la avo kaj Petro. Li malŝraŭbas la lampojn por plenigi ilin. La oleokruĉon li ekprenas per ambaŭ manoj. Ho ve! Ĝi tro pezas, ne sufiĉe alten li povas ĝin levi! Staras ankoraŭ alia, malplena kruĉo, en tiun li verŝos iom Jen, nun bone iras. Li verŝas oleon en ĉiujn lampojn. Ho, kiom longe daŭras! Tiam li purigas la meĉojn, same kiel Petro faras, kaj singarde lumigas ilin.

Dek flametoj flagras, la flamoj kreskas, nun ili klare lumas kaj ĵetas sian helan brilon malproksimen super la maro, same kiel aliajn vesperojn.

Hu! kiom ŝtormas kaj la pluvo batas la fenestrojn. Klaŭs iras malsupren. La avo ankoraŭ kuŝas dorse sur la apogseĝo kaj kvan-



kam Klaŭs lin vokas, li ne respondas. Klaŭs sentas sin tre forlasita. Larmoj saltas al li en la okulojn, sed brave li retenas ilin.

El: „Op Zonnige Wegen” J. B. Wolters, Groningen, Den Haag, Batavia.

„Mi zorgos la tutan nokton por nia lumo,” li laŭte diras, kvankam li scias, ke neniu tion aŭdas. Tiam li pripensas, kion li devas fari entute. Li kuras supren, malsupren. Unue li devas fermi kaj rigli la turopordon malsupre. Tiam li ree iras supren kaj purigas refoje la meĉojn, ĉar kelkaj flamas malegale.

Ankaŭ la vaporkovritaj vitrojn li viŝe purigas. Subite li ekpensas, ke post kelkaj horoj li ree devos plenigi la lampojn. Kaj la oleokruĉoj estas malplenaj! De malsupre el la oleoĉambro li alportas sinsekve tri pezajn kruĉojn. Li ŝpiregas pro la streĉo. Sed devas okazi, alie la lampoj estingiĝos. Kiom bele brile ili lumas! Sed bruegas la maro kaj fajfegas la vento ĉi supre! Nun komenciĝas por la malgranda turogardisto la longa, timiga, nokta gardo.

Hu! kio estas tio? La vento tire malfermis la balkonpordon. Klaŭs devas suriri la balkonon por kapti la anson. Preskaŭ li ne povas resti staranta. Ekstere estas nigra mallumo; nur la blankajn ŝaŭmkapojn de la ondoj kaj la lumcirklon ĉirkaŭ la turo li vidas.

De noktmezo ĝis la tria horo, tio estas laŭ Petro la plej terura tempo, kaj ankaŭ Klaŭs tion opinias. Estas malvarme al li kaj subite atakas lin forta dormemo. Por resti maldorma li pensas pri la rakontoj de Petro; pri la fantomŝipo, kiu ĝuste en tiaj noktoj sin montras kaj pri la ŝipkoboldo. Ĉu tie en la angulo ĝi eble sidas kaj lin alrigardas per siaj falsaj okuloj kaj grimaco?

Klaŭs frotas la okulojn kaj rigardas aliflanken. Volonte li irus malsupren por vidi, kiel la avo fartas. „Sed kiam mi estas tie, mi eble ne plu supren povos iri,” li ree laŭte diras, „ne, mi devas esti ĉi tie, mi devas.”

Li eksidas apud la lampoj, tiel li iom varmiĝas. Momenton li fermas la okulojn — kiom batadas la pluvo kaj kiom muĝas la vento! — jes, mi aŭdas ankoraŭ — ne, mi ne dormas — nur momenton mi fermas la okulojn. Grandan ŝipon mi vidas kun blankaj veloj — bele ĝi veturas

Klaŭs dormas, sed ne longe. La pendhorloĝo batas la trian — nova gardanto devas veni. Sed ne estas iu por anstataŭigi la malgrandan Klaŭs.

Denove li havas laboron: ĉiujn lampojn li devas replenigi kaj viŝi la vitrojn, ĉar ĉi tiuj denove vaporkovriĝis.

Nun li povas dum momento malsupreniri. La avo ankoraŭ dormas kaj aspektas pale. Tiu do ne povas helpi. Klaŭs iras al la kuirejo por kafon varmigi. Petro ankaŭ faras tion. Sed Petro havas krom tio piron kaj ĝi ankaŭ helpas resti maldorma, kaj Klaŭs ne

havas pipon. Ree li surgrimpas la krutan spiralŝtuparon. Kiom bone lumas nia lumo! Jes, ĉinokte ili apartenas al **li**, nur al li, la dek lampoj! Kiom malproksimen brilas la lumo! Ĉiuj ŝipoj ne povas ne vidi ĝin, kiom nigra la nokto estu!

Tiel preterrampas la horoj, malrapide, tre malrapide. Sed finfine do venas la mateno. La ŝtormo kvietiĝas kaj la pluvo subite ĉesas. La matenkrepusko penetras ankaŭ tra la malgrandaj fenestroj de la familia ĉambro. La avo vekigiĝas kaj vokas Klaŭs.

Kio fakte plue okazis, tion Klaŭs poste ne povis rememori. Okazis tiom multe kaj li estis terure dormema, do li nenion pli deziris ol dormi. Kaj tion li rajtis, ĉar Petro revenis kaj ankoraŭ iu alia kaj tiu helpis la avon. Klaŭs ankoraŭ mem estingis la lampojn, ĝuste kiel devis — kaj tiam venis la forta dormemo, kaj li vekigiĝis nur vespere, kiam estis dormotempo, do li ree ekdormis.

Sekvantmatene la vetero estis serena. Fremdulo envenis la lumturon — almenaŭ ili **pensis**, vidante mariston, ke estas fremdulo. Sed tuj poste ili rekonis lin. Estis la direktilisto de la „Marvirino”, la patro de Klaŭs.

La patro de Klaŭs nun sidas kun sia fileto sur la genuoj en la ĉambro apud la seĝo de la avo.

„Estis terura nokto,” li diras, „kaj mia ŝipo perdis la direkton. Se ni ne vidus la lumturon, ni estus perditaj, certe, kaj ankaŭ multaj aliaj ŝipoj.”

„Ĉu vi scias, kiu lumigis niajn lampojn en tiu nokto, kaj gardis kaj prizorgis ilin?” demandas la avo. Kaj kiam lia filo demande rigardas lin, la avo diras akcente: „Tion faris via filo.”

„Ĉu vi faris tion,” diras la direktilisto kaj tuŝas karese al Klaŭs la mallongajn harojn. „Vi estas vera maristido — kaj sen via lumo mia tuta direktado tiam estus vana.”

Li premas la knabon al si. Kaj tra la fenestretoj brilas la hela sunlumo.

El la holanda: VANA.

ĈINA PENSO.

Kiam la sabro estas rusta, la plugilo brileta, la malliberejoj malplenaj, la grenejoj plenaj, kiam la lernejoj ŝtuparoj estas uzataj kaj kreskas la herbo sur tiuj de la juĝejoj, kiam la doktoroj piediras kaj la panistoj rajde, la ŝtato estas bone regata.

Toul, Francujo.

R. DÉLEPINE.



Grupo da infanoj en Benningbroek (Nederlando).
La infanoj ricevas instruon laŭ la metodo en „La Juna Vivo”.



Ĉi tiu foto montras unu el la multaj grupoj, kiuj dum la pasinta vintro lernis Esperanton per „La Juna Vivo”.

Ili neniam antaŭe studis Esperanton; oni uzis nenan lernilon krom la lecionoj en la gazeto, kaj la rezulto estas surpriza!

Multaj el ili deziras korespondi, do se vi ŝatas esplori le taŭgecon de la lecionoj en „La Juna Vivo” mi konsilas al vi: skribu al S.ro B. C. Slooten, Kanaaldyk 269, Koedijk NH, Nederlando.

KION VI DIRAS PRI MIA AMIKO?

Daŭrigo.

- Fric: „Luise, estas nun via vico. Rapidu al la koridoro. Kaj ne subaŭskultu ĉe la pordo, ĉu vi aŭdas?”
(Luise forlasas la ĉambron kaj fermas la pordon post si).
„Nu, kiu el vi havas bonan ideon? Kio prezentos la amikon?”
- Pluraj voĉoj: „Ŝia kudromaŝino”. — „Ŝiaj feltpantofloj” — „Ŝia mufo”.
- Hendriko: „Ĉio sensencaĵo. Mi scias ion pli bonan; ŝia violono!”
- Anjo: „Jes, tio estas bona trovo. La violonon ŝi amas super ĉio”.
- Johano: „Se mi nur scius, kio pri tiu amiko estas direbla.
- Hendriko: „Diru nur, ke ŝi amplene sin premas al li”.
- Johano: „Ĉu ŝi ne koleriĝos?”
- Hendriko: „Kio? Estas ja nur ŝerco. Ŝi ankaŭ incitis min. Hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi”.
- Marie: „Nun finu. — Luise, Luise, eniru! (Luise tremetante eniras).
- Luise: „Kion vi diras pri mia amiko, Hendriko?”
- Hendriko: „Lia kolo estas relative tro longa”.
- Luise: „Vi Anjo?”
- Anjo: „Li laŭŝajne estas tre kaprica; li estas tro ofte misagordita”.
- Luise: „Stranga amiko. — Kion vi volas rimarki pri li, Fric?”
- Fric: „Pri li nenion. Kontraŭe pri vi. Vi tute ne amike traktas lin. Vi ofte traktas lin per bastono tiel, ke li ploras kaj ĝemas. Hodiaŭ matene mi ankoraŭ aŭdis lin kriadi”.
- Luise: „Mi estas vera furio laŭ via juĝo. — Kiel vi juĝas pri li, Herminjo”.
- Herminjo: „Fric faras maljuston al vi. Mi scias, ke vi kore amas lin kaj vi montras tion al li”.
- Luise: „Ĉu mi faris tion! Neeble!”
- Anjo: „Tamen, vi faris! Antaŭ nelonge mi per miaj propraj okuloj vidis, ke vi premas vin al li kaj vi karesas lin.”
- Hendriko: „Jes vere, kaj estis en la krepusko”.
- Luise: „Mi ne plu parolos kun vi. Vi min primokas. Diru foje ion saĝan, Fric”.


Fric: „Via amiko apartenas al malnova gento, kiu verŝajne devenas el Italio. Mi diras ankoraŭ nur tion; en iu rilato li eĉ superas „Bismark“; li havas kvar harojn, por kiuj li tamen uzadas kombilon.”

Luise: „Ha, nun mi komprenas vin. Vi celas mian violonon”.

Harlemo, la 1an de Aprilo

PIKILO.

SOLVOJ DE LA ENIGMOJ EN NO. 20—21.




Montriĝis, ke la enigmoj estis tre facilaj, ĉar ni ricevis multajn bonajn solvojn. Inter la sendintoj, ni dislotis la kvar premiojn. Jen la nomoj de la gajnintoj: S.ro Délépine, Toul, Francujo; Groupe Esperantiste de Dijon, Francujo; F.ino Chauveau, Chateauroux, Francujo; S.ro v. d. Klaauw, Heldero, Nederlando.

r	a	d	i	o
a		u		n
d	u	d	e	k
i		e		l
o	n	k	l	o

NOVAJ ENIGMOJ.

Estas en lumo	sed ne en fajro
„ „ Nederlando	„ „ „ Belgujo
„ „ Januaro	„ „ „ Marto
„ „ urbo	„ „ „ vilaĝo
„ „ nokto	„ „ „ tago
„ „ glacio	„ „ „ neĝo
„ „ vintro	„ „ „ somero
„ „ inko	„ „ „ plumo
„ „ vino	„ „ „ biero
„ „ sinjoro kaj ankaŭ en sinjorino.	



a, a, a, a, k, m, m, n, n,
o, o, o, o, o, o, o, o, p, p,
t, v.

Elektu la ĝustan literon el ĉiu indikita vorto, kaj vi trovos titolon de interesa legaĵo.

Brussel, Belgujo. N. SINDWAD (12-jara).

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonas 4 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Oktobro.

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. Meblon, 2. Plej malgrandan parton de materio, 3. Laston, 4. Ĉarman senton, 5. Prepozicion, 6. Literon.

Letland, Riga. B. R.

FALĈIS HERBON SUR KAMPARO....

Moderato

FALĈIS HERBON SUR KAMPA-RO, EJ, FALĈIS HERBON

SUR KAM - PA - RO SUR KAM - PA - RO KNABINETĈE TEMEŝVA RO.

SUR KAMPARO KNABINETĈE TE - ME - ŜVA RO.

- | | |
|--|---|
| 2. Falĉaĵon ŝi levi volis,
Ej, falĉaĵon ŝi levi volis,
Helpi knabon alparolis: | 3. „Knabo sur la flanko mala,
Ej, knabo sur la flanko mala,
Helpu al knabino pala!” |
| 4. „Helpu vin patrino via,
Ej, helpu vin patrino via,
Pro ŝi vi ne estas mia.” | |

Turĉiansky, Ĉeĥoslovakujo.

DOLINSKY.

KVERKO KAJ KANO.

Iam kverko diris al kano: „Vi certe rajtas plendi al la naturo pro via malforto! Birdeto estas por vi tro peza ŝarĝo, kaj eĉ venteto kurbigas vian kapon! Mi male alte en la ĉielo haltigas la sunradiojn kaj kontraŭstaras la ventegojn. Se vi kreskus ĉe mia piedo, mi defendus vin kontraŭ ĉiuj danĝeroj!

„Vi estas tro bona!” respondis la kano. „Sed — ne kompatu min! Mi kurbiĝas, sed mi ne rompiĝas. Vi ĝis nun estis sufiĉe forta, sed ni atendu ĝis la fino

En la sama momento venis terura ventego. La arbo sukcese kontraŭstaras, la kano kurbiĝas. La vento ankoraŭ pli forte blovas, kaj fine elradikigas la fieran kverkon.

Hautmont, Francujo.

KARLETO.

Ĉiu abonanto rajtas ricevi unu binditan jarkolekton je 20 % da rabato.

LA AMIKECO DE LA BIRDOJ AL LA HOMOJ.

(el „Aventuroj inter Birdoj” de la bonkonata angla naturisto, W. H. Hudson).

Knabo trovis monedon, kiu ne povis flugi kaj kunportis ĝin hejmen.

Post kelkaj tagoj la birdo refortiĝis, estis tute sana kaj povis denove flugi. Sed ĝi ne foriris, kaj ŝajne la kaŭzo de ĝia restado ne estis la fakto, ke oni bone traktis ĝin, sed pro tio, ke ĝi forte amis knabon. Li tamen ne estis la knabo, kiu ĝin savis kaj nutris, sed alia, pli malgranda knabo, kiu loĝis en apuda dometo.

Estis evidente: la birdo komencis pasigi la tempon atendente apud la dometo de sia amiketo.

Ĝi volis ĉiam esti kun li, kaj kiam la infanoj iris en la lernejon, la monedo akompanis ilin kaj restadis tie ĝis la forirpermeso.

Sed la studprogramo ĉiam malpaciencigis ĝin, kaj de tempo al tempo ĝi grakis proteste. Tio sub-ridigis la infanojn kaj finfine oni elpelis ĝin. Post tio ĝi sidis sur la tegmento ĝis la fino de la lerneja tago. Tiam ĝi flugis sur la ŝultron de sia malgranda amiko kaj kuniris hejmen.

Same ĝi kutime sekvis sian amiketon dimanĉ-matene al la preĝejo, sed ankaŭ tie ĝi ne povis silenti, subite grakante tiel, ke la ĉeestantaro kun surprizo kaj ridetoj suprenrigardis.

Mia amiko la paroĥestro ne povis tion toleri, kaj rezulte oni kaptis la monedon kaj senliberigis ĝin ĉiutage dum la horoj de la lernejo kaj diservo.

Anglujo.

trad. la BOURNVILLA Esp. Grupo.

ANEKDOTOJ.

Johano renkontis sian amikon Petron, kiu fumis grandegan cigaron, kaj li demandis al li: „Kial vi fumas cigaron, kiu similas al fosto?”

„Ho, mia kuracisto diris al mi, ke mi ĉiutage povas fumi unu cigaron, kaj mi fabrikigis tiun ĉi.”

Sijbrandaburen, Nederlando.

G. C. TINKELENBERG.

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 7 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

LA DUDEK TRIA LECIONO.

A. Urbano estas loĝanto de urbo. Vilaĝano estas loĝanto de vilaĝo. Klubano estas membro de **klubo**.

B. Nederlando — Nederlandano, ŝipo — ŝipano, Kristo — Kristano, Ameriko — Amerikano, Afriko — Afrikano. Nia familio havas kvar **anojn**.

C. FELIĈO KAJ MALFELIĈO.

Urbano diris al terkulturisto: „Vi terkulturistoj ĉiam bon-**fartas**. Se kreskas malmulta greno, vi povas vendi ĝin por altega prezo.

Kaj se la greno kostas nur tre malmulton, vi vendas des pli grandan amason!”

„Tute kontraŭe!” respondis la terkulturisto. „Ni ne povas riĉ-**iĝi**. Ĉar, se la greno estas multek**osta**, ni posedas nur tre malmulton por vendi. Kaj se ni **rikoltas** multon, ni devas ĝin vendi por nur tre malaltega **prezo!**”

D. LA RABOBESTOJ.

En la **kaĝegoj**, malantaŭ fortaj, grandaj **bariloj**, kuŝas la leonoj, kaj **oscedas**. Multaj viroj, virinoj kaj infanoj staras antaŭ la feraj **kradoj** kaj rigardas la terurajn bestojn.

Subite — granda miro! Museto trakuras la kaĝon. La malsaĝa besteto proksimiĝas **rekte** al la leonoj. Ĝi eĉ saltetas ĝis la piedegoj de la rabobestoj, **flaretas** — kaj, ho! — ĝi **transgrimpas** la **femuron** de unu el la teruruloj.

La leono vidas la muson, **levas** la kapon, flaras, **palpebrumas** kaj — ree oscedas. Li ne **mortigas** la museton: li ja estas la fiera reĝo de la bestoj!

La muso forkuras kaj tra la bariloj eliras.

Ho **kruelaĝo!** Malfeliĉa besteto! **Ombreloj**, bastonoj, kaj ŝuoj de la homoj batas la malgrandan **krimulon**. Ĝi **vekrietas** — kaj jam ĝi mortis.

E. iĝi proksima = proksim-**iĝi**, iĝi ruĝa = ruĝ-**iĝi**, iĝi freŝa = freŝ-**iĝi**, iĝi akra = akriĝi, iĝi ano = an-**iĝi**.

F. Ali**iĝi**, sek**iĝi**, blind**iĝi**, bel**iĝi**, tag**iĝi**, nokt**iĝi**, varm**iĝi**, verd**iĝi**, pur**iĝi**, malpur**iĝi**, pal**iĝi**, ĝoj**iĝi**, malĝoj**iĝi**, pleni**iĝi**, malpleni**iĝi**, lumi**iĝi**, mallumi**iĝi**, sani**iĝi**, forti**iĝi**, blanki**iĝi**.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D, E, F.
- II. Traduku A, B, C, D, E, F en vian gepatran lingvon.
- III. Rakontu la historion pri „Feliĉo kaj malfeliĉo” en via grupo.
- IV. Legu kelkfoje la rakonton pri „La rabobestoj” kaj respondu al jenaj demandoj:

Kie kuŝis la leonoj? Kion ili faris? Kiuj rigardis la bestojn? Kio okazis? Kion faris la muso? Ĉu la leono vidis la museton? Kion li faris? Kial la leono ne mortigis la muson? Kien iris la muso? Ĉu tio estis saĝa? Kio okazis?

LA DUDEK KVARA LECIONO.

A. Se ni havus flugilojn, ni povus flugi. Se mi estus riĉa, mi farus grandajn vojaĝojn.

B.

LA RUZA FRICO.

Frico estas saĝa bubeto. Kun la patrino li vizitis la onklinon. Frico devis promesi, ke li nenion petos por manĝi ĉe ŝi.

Nun li sidas ĉe la onklino kaj la patrino tre vigle parolas kun ŝi. Ili ne havas tempon por la bubeto. Li ĝis nun ne ricevis eĉ unu ĉokolado-pecon. Kaj Frico — kiel ĉiam ĉe la onklino — ege malsatas.

Jen li ruzas: — „Onklino, ĉu vi sentas malsaton?”

„Ne, karulo mia!” kun miro respondas la onklino.

„Ho,” ĝemas Friĉjo, „se mi estus vi!” —

Kaj li ricevis grandan pecon da ĉokolado.

C.

LA KAPABLA FILO.

Riĉa homo petis aŭdiencon ĉe la fama Germana diplomato Bismarck. La riĉulo deziris havigi al filo ŝtat-oficon.

Pro tio la fiera patro inter-alie certigis:

„Mia filo estas multtalenta! Li povas paroli ses lingvojn.”

Bismarck, kiu ne taksis la homojn laŭ la nombro da lingvoj, kiujn ili studis dum multaj jaroj, respondis: „Via filo povas uzi ses lingvojn? Jen li taŭgas precipe kiel — ĉefkelnero!”

Schattendorf, Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

D. igi verda = verd-igi, igi certa = cert-igi, igi varma = varm-igi.

E. Beligi, grandigi, sanigi, re-sanigi, altigi, plialtigi, mal-altigi, alligi, anigi, forigi, akrigi, blankigi, blindigi, dikigi, apartigi, varmigi, entuziasmigi, pintigi, publikigi, ordigi.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D, E.
- II. Traduku A, B, C, D, E en vian gepatran lingvon.
- III. Rakontu la historion pri „La kapabla filo” en via grupo.
- IV. Legu kelkfoje la rakonton pri „La ruza Frico” kaj respondu al jenaj demandoj:

Ĉu Frico estis saĝa bubeto? Al kiu li iris kun la patrino? Kion li devis promesi? Kion faris la patrino? Ĉu ili atentis la bubeton? Ĉu Frico ricevis ion? Kion li havis? Ĉu li estis ruza? Kion li diris? Kion li tiam ricevis?

„La Juna Vivo” kreskas!

Antaŭ kelkaj semajnoj ni enskribis la 100an abonanton en Francujo. Kiel surprizon ni sendis la binditan jarkolekton. La feliĉulino estis: F.ino Van-ackere en Boulogne-sur-Mer.

La „Franca Esperanto-Asocio” (fondita 1898) organizis grandan nacian konkurson inter gelernantoj de sia perkoresponda kurso. Kiel premiojn oni donis 23 abonojn je „La Juna Vivo”.

ATENTU!

KORESPONDADRESOJ: ĉiu vorto: 0,03 gld.

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto, aŭ grupo, havas la rajton enpresigi senpagan korespondadreson unufoje en la jaro.

Italujo: S.ro Brizzi Agostino, Via Mugelli 2, Pisa, deziras korespondi per L. kaj PK. I kun Svedaj, Norvegaj, Danaj kaj Nederlandaj gesamideanoj. Respondo certa.

Italujo: S.ro Casini Giovanni, Via S. Maria 91, Pisa, deziras korespondi kun Japanujo, Ĉinujo, Hindujo per PK. I., montrantaj naciajn kostumojn aŭ vidindaĵojn. Certe respondos.

Japanujo: DESEGNAĴOJN KAJ PENTRAĴOJN de popollernejaj infanoj en la tuta mondo mi petas por ekspozicio kaj sendos rekompence tiajn de Japanujo. S.ro Nomura-Yōkiti, Sinsenbatyō 62, en Hirosima.

Nederlando: H. Merkus, David Blesstr. 114, den Haag, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Tiun, kiu sendas 100 pm. el sia lando, mi rekompencos per 100 ekz. el Nederlando.

Nederlando: 14 jara knabo deziras korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj. Skribu al: B. Jukema, St. Anna Parochie (Fr.).

Al la abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonmonon por la nuna jaro, ni afable petas: faru tion baldaŭ. Tiel vi ŝparas al ni multe da laboro kaj al vi mem la kvitanckoston.

RECENZOJ PRI „LA JUNA VIVO”.

„Nederlanda Esperantisto” (No. 12, 21 Junio '35): Jam la fakto, ke tiu ĉi organo travivis sian unuan — ĝenerale plej malfacilan — jaron pravas, ke la redaktorino disponas pri persistemo kaj nia juna Esperantista generacio ŝatas tian gazeton. Nemirige, ĉar la estrino kaj kunlaborantoj sukcesis igi la enhavon interesa, instrua kaj varia. Legendoj, rakontoj, lecionoj, anekdotoj, kantoj, ludoj kaj enigmoj, jen spicita manĝaĵo, kuirita speciale por 12-16 jaraj gejunuloj, sed — kiel montris la praktiko — ŝatata ankaŭ de multaj plenkreskuloj.”

„Flandra Esperantisto” (No. 1 — Julio '35): „..... La teksto estas pliklarigita per belaj portretoj, gravuroj, desegnaĵoj, k.t.p. La kunlaborantoj konsistas, preskaŭ senescepte el geinstruistoj. Prijuĝante ĝin, ni plezure ripetatas, kion S.ro H. Rainson skribis en Flandra Esperantisto No. 3 (Sept. 1934): „La Revuo ne nur estas interesa por infanoj, sed ankaŭ por novaj esperantistoj. Ĝi estas tre utila, ĉar la lingvaĵo estas simpla; kiel eble plej malmulte da participoj kaj mallongaj frazoj. Tial mi konsilas al ĉiu grupo, prenu abonon por la grupo, ĝi certe helpos perfektigi la novajn esperantistojn. La revuo estas ankaŭ utila kiel manlibro en perfektiga kurso: tion ni intencas fari por la venonta kurso”.

„Svenska Arbetar Esperantisten” (No. 6-7, Julio '35): „..... Niaj fervoraj nederlandaj amikoj atingis la unujaran kolekton de la bonege redaktita gazeto „La Juna Vivo”, kiu vere plenumas bezonon inter niaj aliaj organoj. Presita sur bonega papero kun bonaj ilustraĵoj kaj elektita por gejunuloj teksto la gazeto faras bonan servon ĝuste en tiu medio de nia movado. Ni gratulas kaj deziras bonan daŭrigon!

„Dansk Esperanto-Blad” (No. 4, Junio '35): „..... „La Juna Vivo” pretendas du celojn: ĝi estas la gazeto de la 12-16 jaraj infanoj kaj de komencantoj. La enhavo estas interesa kaj pedagogie valora, kaj la libro estas rekomendinda al ĉiuj kluboj kaj progresantaj kursoj”.

„Sennaciulo” (Junio '35): „..... La kompilado okazis kun pedagogia talento.”

„La Semanto” (No. 5, Junio '35): „..... Bonega eduk- kaj instru-libro por junaj esperantistoj kaj komencantoj. Spritaj rakontoj, lecionoj, instru-bildoj, kantoj kun muziko, poemoj, jen la enhavo de la gazeto. Ni varme rekomendas al ĉiuj, ĉi tiun bonegan kolekton kaj gazeton.

„Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista” (No. 4, 18/6-'35): „..... La bona junulargazeto prezentas sian jarkolekton en plaĉa volumo riĉe ilustrita.”

„Bulgara Esperantisto” (No. 9-10, Majo-Junio '35): „..... Tiu bela ilustrita revuo estas fondita por 10-16 jara junularo kaj por komencantoj. La ĉefrakontoj estas ĉerpitaj el lernejaj lernolibroj kaj taŭgaj speciale por mezlernejoj. La verkistoj kaj tradukistoj estas preskaŭ senescepte geinstruistoj, sciantaj la pedagogiajn postulojn por tia laboro. Prezo moderna. Ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj.

„Verda Revuo” (No. 7/8-'35): „..... La fakto, ke tiu ŝatata leginda gazeto travivis sian unuan jaron, pravas, ke tia gazeto estis vera bezono.”

MALALTIĜO DE LA REKLAMTARIFO:

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.;

Abonu tuj la monatan revuon
„FLANDRA ESPERANTISTO”
 Interesa enhavo; facile komprenebla
 lingvo; aktuala, malmultekosta.
 Jarabono: 25 frankojn; 1,25 gld.
 Novaj abonantoj anoncu sin ĉe:
 Flandra Ligo Esperantista, Kortryk.
 Poŝtĉeko: 2321.50.

„ONDO DE DAŬGAVA”.

Monata gazeto, eldonata de

Latva Esperanto-Societo,

P.K. 844, Riga (Latvija).

Abonkondiĉoj: Ls. 3.50 jare,
Ls. 1.50 duonjare.Redaktorino: **Ludmila Jevsejeva.****„KAN — U — GO”**

Tre ŝatata ludo en Anglujo, nun have-
 bla en esperanta eldono. Ludebla de
 unu ĝis sep personoj. Eldonas „Brita
 Esperanto-Asocio”. Mendebla ĉe la re-
 dakcio de

„La Juna Vivo”

Prezo: 0,94 gld.

**ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO
(FRANCUJO).**

FUNDAMENTA KRESTOMATIO. Unu
 volumo (12 × 19 cm), 460-paĝa.
 Prezo: broŝ. (14-a eldono): 1,50 guld.;
 bind.: 2,00 guld.

LA FARAONO. Romano de Prus, el la
 pola lingvo tradukis D.ro Bein. Tri vo-
 lumoj. Prezo: 3,60 guld.

VERDKATA TESTAMENTO. Kolekto
 de gajaj deklamaĵoj en versoj de Ray-
 mond Schwartz. Prezo: 1,00 guld.

(1 guld. 2,1 sv. fr.). Ĉi tiuj libroj estas
 mendeblaj ĉe la redakcio de „La Juna
 Vivo”. Por la afranko bonvolu aldoni
 10 %.



Sub Stela Signo

Geedziĝis

JOHANO-SIPKE STUIT

kaj

SIMONE-MARI DECAUDIN

ARRAS (Franclando)

La 6an de Julio

Aperis jam la II-a eldono de esperanta
 lernolibro de prof. Sygnarski:

**„LECIONOJ DE MONDLINGVO
ESPERANTO”**

tute ŝanĝita

La unua esperanta lernolibro ŝtate ap-
 robita por uzado en polaj lernejoj.
 Prezo por eksterlando: 3 zl. Mendojn
 akceptas „Scienca Esperanta Rondo”
 Bydgoszcz, pl. Wolności 9. Polujo.

La plej Granda Utileco de Esperanto

estas, ke per ĝi ni povas ekkoni la
 vivon de malproksimaj popoloj, kies
 lingvoj estas tute malsamaj de eŭro-
 paj.

Ekkonu pli profunde la kulturon de
 Japanujo, la lando de la **Leviganta Su-
 no** kaj la nova spirita movado **Oomoto!**
Petu specimenon de la esperanta, ilu-
 strita, monata, riĉenhava gazeto, al:

„Oomoto Internacia”

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

**Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio
 de „La Juna Vivo”!**